



Venu al nia

# Zamenhoffesto 2023

Ni invitas ĉiujn al agrabla kunestado dum la ĉi-jara Zamenhoffesto kaj librofesto:

**Loko:** Kiezspinne - Oranĝerio,  
Schulze-Boysen-Straße 38, D-10365 Berlin

**Tempo:** Sabate, la 25-an de novembro 2023,  
15:00\*-19:00 h

**Programo\*\*:**

- Malfermo
  - Festprelego
  - Salutvortoj de gastoj
  - Prezento de interesaj libroj
  - Fritz Wollenberg: La plej novaj urbogvidiloj por Berlino
  - Koncerto de Stefo (Stefan Schneider)
  - Koncerto de Hans Moser
  - Surprizo el Ŝĉeĉino
  - Muziko el la konservujo
- Dum la tuta tempo de la aranĝo:
- Libroservo

Do, venu amase kaj ĝuu internacian kaj neforgeseblan etoson, pligrandigu vian librotrezoron kaj ĝojigu vian stomakon per laŭkristnaskaj manĝaĵoj aŭ simple babilu kun malnovaj kaj novaj amikoj aŭ kolektu ideojn por kristnaskaj donacoj!

Se vi deziras aldoni specialaĵojn al la manĝotablo (kukoj, kuketoj ... estas ofertitaj), bv. kuraĝi! Por ŝatantoj de aliaj manĝaĵoj la kuireja giĉeto malfermiĝos (memservado je propraj kostoj).

Partoprenkotizo: 5,00 €\*\*\*, aŭ mondonacon laŭ viaj eblecoj (listo kaj „kolektujo“ troviĝas ĉe la enirejo).

Ni vidos nin en Berlino,

Ĝis tiam

*Ronaldo*

prez. ELBB

Kontakto por aliĝo kaj demandoj pri alvojaĝo aŭ aliaj detaloj: [RonaldSchindler@web.de](mailto:RonaldSchindler@web.de),  
tel.: +49 1514 1419673

Aktualaj informoj sub: <https://esperanto.berlin/de/>

\* preparado ek de la 14-a horo por helpemuloj

\*\* ŝanĝoj de la programo eblas

\*\*\* por niaj polaj amikoj kaj senlaboruloj